

B I L E T O D E L A P R E Z I D A N T O

Notre Congrès s'est tenu, comme prévu, à Montmartre, et a permis à un certain nombre d'entre nous - trop peu nombreux, hélas, de passer quelques heures en "Esperantujo", et de faire le point des diverses questions à l'ordre du jour dont il est rendu compte par ailleurs.

Merci à ceux qui sont venus. Mais il faut que cette manifestation annuelle devienne vraiment les assises de notre Association tant par des présences beaucoup plus nombreuses que par les avis, questions, suggestions qui permettent la participation de nos membres aux décisions, orientations et à la vitalité de notre groupe.

Nous voici à la veille des vacances d'été. Il convient de penser dès maintenant à l'année 1973-1974 - tant pour l'organisation du prochain Congrès que pour celle de l'effort de propagande des groupes locaux. Ceci exige, de la part de chacun, et dans toute la mesure du possible, une action concertée en faveur de la diffusion de la langue, de l'organisation de cours, cercles, réunions, avec ces groupes.

Il est important de parler Esperanto entre nous, au cours de nos rencontres, et de profiter de celles-ci pour acquérir une pratique nécessaire dans les relations internationales que nous aurons à nouer. Et de continuer à correspondre avec les amis étrangers que nous aurons fait entrer dans notre cercle de sympathies. Seuls ce qui comprennent l'aspect pratique de l'Espéranto et qui l'utilisent font faire un progrès au Mouvement auquel nous participons.

A tous je souhaite un été fructueux, où le repos du corps et de l'esprit s'alliera à des nouveaux contacts, de nouvelles amitiés, et, au cours de voyages intéressants et enrichissants, contribuera à l'essor de ce moyen privilégié de communication : l'Espéranto, langue de la Paix, de l'Amitié, pont entre les hommes de toutes les langues, de toutes les cultures, de toutes les tendances, par lequel passent la compréhension, la tolérance et la sympathie.

R. Cl. COLAS.

#####

M I A L I B E R I G A N T O V I V A S

... "Kompatu min, kompatu min, miaj amikoj;
Ĉar la mano de Dio frapis min.

(21) Kial vi persekutas min, kiel Dio,

Kaj ne povas satiĝi de mia karno ?

Ho, se miaj vortoj estus enskribitaj,

Ho, se ili estus gravuritaj en libro,

Per fera skribilo kun plumbo

Gravuritaj por eterne sur roko !

Sed mi scias, ke mia Liberigonto vivas

Kaj fine Li leviĝos super la polvo.

Kaj post kiam mia haŭto estos tiel detruita

Kaj mi estos sen korpa, mi vidos Dion;

Lin vidos mi, kaj miaj okuloj vidos, ne fremdaj;

Pri tio sopiregas mia interno en mia brusto.

(el IJOB 19-21/27)

Meditato :

Mia Liberiganto vivas; Li diros la lastan vorton ! Kiel
skribis la poeto rigardante la krucon : Dio venis nek por forigi
la suferadon, nek por klarigi ĝin per Sia ĉeesto. De la komenco
ĝis la fino de la Historio, staras nur unu sola kruco, tiu de Jesuo.
Ni ĝin portas kun Li; tiam ĝi portos nin. Kun Li en la malfeliĉo,
ni estos kun Li en la venko. Aŭskultu Jesuon; kie mi estas, tie
ankaŭ estos mia servanto.

(El "Vie Chrétienne N° 149").

=====

L I N G V A A N G U L O

+++++++†+++++++

I- TRADUKA PARTO/.

Al la esprimoj proponitaj en N° 95 venis aldonaj tradukoj
de S-ro Despiney :

- 1)) bone vivi en sia haŭto; 2) senti alvenon de malsano;
- 3) vi ne estas laŭ la bona ondolongo; 4) ĉiuflanke gajni; 5)
- trinki glason da io; 6) bone toleri marvojaĝojn; 7) malbonege
- humori; 8) gajni ion malgajnigante iun; 9) koleriĝi; 10) fipolicisto.

.../...

.../...

Por la N° 8, S-ro Bourgois proponas: produkti sian buteron per alies lakto.

Al la aprilaj proponoj respondis : S-roj Bourgois (Bo), Broise (Br), J.M. Guillon (G), Jahier (J), Ribot (R), kaj S-ino Mich au (M) :

Jen iliaj tradukoj :

- 1) la boucler : ŝlosi la buŝon (Bo); bukfermi la buŝon (Br); ŝlosi siajn lipojn (D); ĉesi paroli (G); buŝbukli, buŝŝlosi (J); singarde, timeme silenti (R); prudente silenti (M).
- 2) cela tient à un cheveu : ĝi pendas nur sur fadeno, ĝi dependas nur de unu haro (Bo); tio dependas de unu hareto (Br); tio estas hazardega (G); nur hareto, nur fadeneto tenas tion (J); tio pendas ĉe unu haro (R); eta evento povas tion influi (M).
- 3) c'est une petite nature : li estas ja de delikata sano (Bo); li estas de malforta kompleksio (Br); li estas malfortulo (D, J) li trozorgas pri sia sano (G); li estas timemulo, senreakcia (R); li estas fizike nerezistema (M).
- 4) mettre quelqu'un dans sa poche : superregi iun (Bo); tutdecidi por aliulo (Br); venki, senatentigi iun (D); fari iun senpotenca (G); samopiniigi iun, havi iun por si gajni iun je sia opinio, fizike (aŭ ruze) superi iun (J); superruzi, enretigi, ekkapti iun, (R); estinekompareble pli forta (aŭ kapabla)(M).
- 5) le fond de l'air est frais : entute la aero estas malvarmeta (Bo) en si mem la aero estas malvarmeta (Br); la ombraj lokoj estas malvarmetaj (D); la aerfundo estas malvarmeta (G); esence l'aero estas freŝa, la temperaturo kvazaŭ reale estas freŝa (J); verdire, fakte la aero estas malvarmeta (aŭ ne varma) (R); pli ol ŝajne malvarmeta estas la vetero (M).
- 6) pas question : tute ne ! ja ne ! (Bo); ekster temo ! (Br); certe ne ! (D); tute ne elpensebla (G); absolute ne ! Oni ne eĉ priparolu tion ! Ne temas pri tio ! (J); tute ne ! nepre ne ! (R) jam decidite ! (M).
- 7) il habitait Paris : li logis en Paris en 1967, sed li estas loĝinta ankaŭ en Versailles samjare (G); ... Li loĝis ankaŭ en V en tiu sama jaro (R); li loĝis ioman tempon ankaŭ en V. en la sama jaro (M)
- 8) boute-en-train : gajigulo (Bo, Br, J); ĝojiganto (Do); ŝercemulo (G) amuzanto ĝojiga kunulo (R).

.../...

.../...

Bilanco de la jaro 1972

ENSPEZOJ		ELSPEZOJ	
Saldo 1/1/72	1.923,34	"	
Kotizoj	765,00	"	Bulteno 394,94
Donacoj	98,00	"	Korespondado 124,08
Profito kongreso	125,00	"	Diversaj 59,10
Rentumo sparkaso	89,98	"	
	<hr/>		<hr/>
	3.001,32	"	578,12
Saldo 31/12/72 : 2.423,20		"	p.ĉ.k. 441,53
			ŝparkaso 1.981,67
			<hr/>
			2.423,20

BUDGETO 1973

Kotizoj	800,00	"	Bulteno	500,00
Profito kongreso	100,00	"	Korespondado	200,00
Rentumo ŝparkaso	100,00	"	Vojaĝelspezoj	100,00
			Informado	200,00
	<hr/>		<hr/>	
	1.000,00		1.000,00	

RENOVIGO de la nacia komitato

		Rezulto de la voĉdono
S-ro BARRIER	: 26 voĉoj	reelektita
S-ro LIGO	: 26 voĉoj	reelektita
F-to MARMOU	: 26 voĉoj	reelektita
S-ro RIBOT	: 24 voĉoj	reelektita
F-ino VANNEAU	: 26 voĉoj	(nova kandidantino)elektita

La nova estraro konsistas el :

- Prezidanto : S-ro COLAS
- Vicprezidanto : S-ro LIGOT
- ĝenerala Sekretario : S-ro DESPINEY
- Kasistino : S-ino VINCENT
- religia konsilanto : S-to BAUDRY
- Asesoroj : F-to MARMOU, S-ro MORIN

Proponoj por la venonta kongreso :

S-ro PIERRU proponas N.-S-ino de Montligeon sed la ĉeestantoj opinias malfacile atingebla; pro la sama kialo ili malakceptas proponon pri Evreux. Propono pri ANGERS pli allogas. S-ro Despiney

.. /...

kontakto S-inon Cheverry. Principe la kongreso okazos la 11-an kaj 12-an de Majo 1974.

La propono de S-ro LECROISEY estas prokrastita por ke la konsilio pristudu ĝin.

La venonta konsilia kunveno okazos la 30-an de Septembro, je la 15-a horo en la nova sidejo de UFE, 4 bis, rue de la Cerisaie 75004 PARIS.

Protokolis : S-ino MICHAU

XX

L A R O Z A R I O (fino)

Iuj diras al ni : bone preĝu ! Maria diras al ni : multe preĝu ! (Ĉar oni malofte staras por "bone" preĝi, tiam, prefere ol malbone preĝi, oni tute ne preĝas). Malmulte da fidantoj kapablas preĝi bone. Ĉiuj kapablas multe preĝi.

Ho ! Kiel Maria, dum siaj aperoj, insistas sur tiu "multe preĝu !" Nu, la rozario estas la preĝo de la "multe". Ĉu oni sufiĉe pensis pri ĉi tio : ĉiu Ave estas ago de volo, ago de libervolo, : do, kiu kunportas en si meriton; eĉ sur la meriton de la obeo, por nenion diri pri la virto de la "parolo", sur kiu estas fondata la tuta mistero de la liturgio. La malatentoj ? Ili estas en la homeco kaj nenio estas postulata, kiu irus kontraŭ nian ecaron. Kiu do ankaraŭ ĉi tie, havas intereson nin malkuraĝigi, frontante nin al la sublimo ?

La ardon de nia preĝo Dio donas al mi, sed, kaj eĉ se ĝi estas nefekunda, la agon preĝi mi donas al Dio, per la rozario, destinis por elpeli el tiu mondo la Princon de la mallumo, por ke venu la regno de Kristo Reĝo.

Ĉiuj tiuj Ave, tiuj Ave, kiuj amase kunpuŝiĝas, supreniras kaj plenigas la ĉielon - kaj ĉiu estas "forto" - estas nia necesa alportajo, tiu grandega potenco, kiun ni metas en la manojn de ŝi, kiu devas venki, sed venki per ni.

*

Maria, en La Salette, tiele kaj tre strange sin prezentas : la ŝultroj ŝarĝitaj per peza ĉeno. Roza girlando estanta apud

.../...

.../...

la ĉeno. Kiel ne vidi en tiel aŭdentaj simboloj, ke estas la rozario forĝonta la ĉenon, per kiu Satano estos ligita ? Ĉar Satano estos ligita per ĉeno. Sankta Johano, kiu indikas al ni en sia Apokalikso la batalon de la Virino kontraŭ la Drakon, proklamas, laŭ ordono de Dio, ke Satano estos venkita kaj enĉenigita. Kaj de kiu li estus enĉenigita, se ne de ŝi, kiu ekde la komenco estas promesita por tiu venko ?

La rozario ne estas individua kaj egoista devocio. Estas la preĝo de la Batalo, le preĝo de la mistika Korpo, la armilo de Jerusalem kontraŭ la atakoj de Babilono.

Raoul AUCLAIR

eltirata el
Notre-Dame des Temps Nouveaux
kaj tradukita de Marcel COLLEU

XX

N I A M E M B R A R O

- 1) Dumvivaj membroj : 28) S-to ALBY (Aude);
29) S-ro FRESNEAU (ille-et-Vilaine)
30) F-ino STUTZMANN (Haut-Rhin)
- 2) novaj membroj : 4) S-ro HENRY (Essonne)
5) S-ro LEEB (Puy-de-Dôme)

XX

FONDUSO-DOMO (4-a listo)

- 18) S-ro Laffargue : 50Fr; 19) S-ro Bessière (2) : 100 Fr;
- 20) Anonimulo : 50 Fr; 21) Anonimulo : 50 Fr; 22) S-ro Thiollière (5) : 50 Fr; Anonimulo : 30 Fr-
- Fina sumo : 1.273 Fr-

.....

A N O N C O :
=====

22-jara japana fraŭlino, deziras korespondi kun francaj katolikaj esperantistoj :
F-ino H. B. Katayama
120-3 TONO-KAWA, UJI
UJI-SHI 611 KYOTO
JAPON

Kial ne Esperanto-Rondo akceptas, kolektive, interŝanĝi leterojn kun japana samideanino kaj samkredanino ?

=====



SALUTON, MARIA...

La nuna moderna vivo ja estas malfacila kaj prema, kvankam la homoj ĝuas pli da libertempo ol iam ajn antaŭe. La kristanoj uzu ĉiun liberan minuton por sin turni al la Dipatrino; ili ne hontu ŝin alvoki, ŝi estas tutpotenca kaj ŝia dia filo nenion povas rifuzi al ŝi.

Ni preĝu al ŝi en ĉiu sanktejo al ŝi dediĉita, ni iru admiri la multajn bildojn faritajn pri ŝi en la diversaj landoj, kiujn ni vizitos ĉisomere, ekzemple tiun belegan ikonon "Virgulino kun sia infano", nomitan "deimperiestro Stefano" (ĉirkaŭ 1350. Serba skolo).


Ni pilgrimu al la sanktaj lokoj, kie ŝi sin manifestis: Lourdes, Fatima. Eĉ se ni restos hejme, ni alvoku ŝin pere de la rozario. Tion ŝi mem petis de Bernadette en Lourdes. kaj tion simple faris ĉiuj plej grandaj sanktuloj.

Nia fido al Maria plifirmiĝu kaj nia vivo iĝos pli facila...



Ĉijare, la katolikaro festas la 100-an datrevenon de la naskiĝo de S-ta Tereza el Lisieux, dua patronino de nia lando kaj patronino de la misioj. Same kiel ŝi, ni preĝu por la sukceso de la misiaj laboroj sur la tuta terglobo; ni helpu la misiistojn kiel eble plej multe, ĉu materie, ĉu spirite. Ilia tasko estas tre malfacila: ili alfrontas aliajn klimatojn, aliajn kutimojn, aliajn homojn, aliajn lingvojn.

Ni daŭre pensu, ke KATOLIKA signifas UNIVERSALA, ke ni devas helpi la alvenon de la krista evangelio ĝis la ekstremo de la TERO...




Dio bezonas la nomojn, sed la homoj bezonas Dion, kiu sola rajtas pardoni iliajn pekojn. Por liberigi la homon el lia peko, Jesuo akceptis la morton sur la kruco, sed li releviĝis kaj daŭre vivas meze de ni.

Tion ni ne forgesu kaj ni ofte preĝu al nia ĉiela Patro, ankaŭ al nia ĉiela Patrino...


(La ĉi supra bildo montras la panelon, kiu situas en la kapelo sur la Olivarba Monto en Jerusalemo).

SALUT' REGINO

-o-o-o-o-o-



Sa-lut' Re-gi-no, Pa-tri-no kom-pa-te-ra, vi-vo mil-de-co,



es-per' ni-a sa-lut' Al vi, ni vo-kas, ek-zi-laj fi-loj de E-va.



Al vi ni so-pi-rao ge-man-te plo-ran-taj en ni-a larm-ple-na va-lo




Do, sek-va, ad-vo-ka-tin' ni-a, ti-ujn vi-ajn mi-ze-ri-ko-r-dajn




o-ku-lojn al ni ek-tur-nu. Kaj Je-su-on be-na-tan, fruk-ton el vi-a



lin', al ni post la ek-zi-li-o mon-tra-du O — bo-na,



O — pi-a, O — mil-da vir-ga Ma-ri-a.



L A N O V A S I D E J O D E U. E. F.

=====
Kiam, nova esperantisto, en 1965 mi unuafoje vizitis la sidejon straton Chabrol en Parizo, mi ne ricevis bonan impreson. Tiu malnova loĝejo instigis min pensi, ke Esperanto estas afero tiel maljuneta kiel tiu polva ejo. Feliĉe rideto de la deĵorintino F-ino Paulier tion kompensis !

Jam de longe, multaj valoraj esperantistoj vizitis tiun sidejon, multaj laboris, laborigis en ĝi. Pro tio ĝi estas respektinda. Sed nenio eterne daŭras sub nia suno. En decembro 1971 forpelan akton sendis al UFE la proprietuloj. Ekde tiam, oni sciis, ke la lastaj tagoj de Chabrol-sidejo estas nombritaj.

Dum la nacia kongreso en Nantes (1972), oni elektis komisionon kies tasko estis akiri propran sidejon por UFE. La komisionanoj serĉis kaj vizitis multege da ejoj; fine ili malkovris sufiĉe taŭgan sidejon por niaj celoj.

Temas pri butikoj proksime de du metrostacioj : "Bastille" kaj "Sully-Morland". Ĝi troviĝas 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 PARIS, en domo ĵus renovigita.

Sen mono oni nenion akiras. Feliĉe jam de longe la financa afero estas en la manoj de kompetenta kaj persistema viro, nia amiko Pierre Royer, kiu dank' al la "Fonduso-Domo", kiel formiko, amasigis multajn donacojn aŭ donacetojn. Plie, rapide aldoniĝis pruntodonoj. Dank'al tio, la 10-an de aprilo 1973, je la 11.30, UFE fariĝis proprietulo de sia propra sidejo. La notaria akto estis subskribita antaŭ Me Delesalle, notario, de P. Royer (representanto de D-ro Albault, prezidanto de UFE) kaj de J. Thierry (representanto de la pruntodonantoj). Post la subskribo, ne ĉio estas finita : nun du emeritoj komisiitaj de la estraro okupiĝas pri la riparlaboroj : ekstera fasado, internaj renovigoj (muroj, plankoj...), aranĝo de la keloj. R. Despiney havas la taskon fari la instaladon de la nova sidejo kaj la translokiĝon "Chabrol-Cerisaie".

La nova sidejo estas multe pli alloga ol la malnova pro pluraj kialoj : la kvartalo estas pli agrabla, la butikoj pli facile videblaj ol la dua etaĝo antaŭ sidejo, la tuto lasas modernan impreson kaj donas la eblecon diri : "Esperanto ne estas antikva afero - sed ĝi vere vivas !" .../...

